

Plej bone estus, se anstataŭ diversaj grandaj kaj malgrandaj eŭropaj regnoj ni havus iom proporcie kaj geografie aranĝitajn "Unuiĝintajn Ŝtatojn de Eŭropo".


L. L. ZAMENHOF

# BAZARO

---

Esperantlingva revuo, Cluj-Napoca, Jaro II, Numero 4 (7)  
1998, Vintro

---



ISSN 1453-7478

## ABONO !

La abono por la sekvanta numero de BAZARO por Rumanianoj estas 3.000 leoj aŭ egalvaloro en poŝtmarkoj kaj por eksterlandanoj 1 IRK.

La abonon bonvolu sendi al jenaj adresoj:

**C.P.1111. RO-3400 CLUJ-NAPOCA** por KOLOZSVÁRI Zsolt aŭ

**C.P.200. RO-3400 CLUJ-NAPOCA SIGMOND Júlia**

Ni akceptos donacojn, subtenojn kaj varbas distribuantojn por nia gazeto!

Dankon, La red.

**Ni dankas al niaj subtenantoj, kiuj laŭ siaj eblecoj helpis nin:**  
G. DONÁTH Blanka el BUDAPEŬTO, kiu sendis al ni 5000 HUF.  
MUNICIPA KULTURDOMO, ĉar ebligis al ni redakti la 7-an numeron de BAZARO.

## ABONEBLECO

Por la jaro 1999 estas ebleco aboni je HEROLDO DE ESPERANTO kaj LITERATURA FOIRO.

Heroldo de Esperanto (16 numeroj) 120.000 leoj

Literatura Foiro (6 numeroj) 104.000 leoj

Interesiĝantoj bonvolu sendi la monon antaŭ la jarfino al la perantino: 'SIGMOND Júlia, 3400 CLUJ-NAPOCA C.P.200.

La redakcio ne respondecas pro la artikoloj skribitaj de niaj kunlaborantoj, kaj ili ne nepre reflektas la opinion de la redakcio. Ni ne resendus la manuskriptojn, nur se vi nepre petas tion!

Oni rajtas aperigi artikolojn el BAZARO sub la kondiĉo, ke oni indiku la fonton.

### *Redakcio:*

ASOCIO de ESPERANTO CLUJ  
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111  
RUMANIO

### *Eldonas:*

Eldonejo DOKIA  
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,  
RUMANIO kaj  
MUNICIPA KULTURDOMO  
P-ta Unirii n-ro 24  
RO-3400, Cluj-Napoca, RUMANIO

### *Redakcia komitato:*

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,  
KOLOZSVÁRI Zsolt

*Aperas:* kvaronjare

### *Redakcia:*

ASOCIATIA de ESPERANTO CLUJ  
RO-3400 Cluj-Napoca, C.P. 1111  
ROMANIA

### *Editata de:*

Editura DOKIA  
P.O. Box 1-452, RO-3400 Cluj-Napoca,  
ROMANIA si  
CASA MUNICIPALA de CULTURA  
P-ta Unirii nr. 24  
RO-3400, Cluj-Napoca, ROMANIA

### *Comisia de redactie:*

Radu CRETU, 'SIGMOND Júlia,  
KOLOZSVÁRI Zsolt

*Apare:* trimestrial

## RUMANAJ KONTRIBUOJ AL INTERNACIAJ E-ARANĜOJ

Pro la UK de Montpeliero, ĉi jare abundis E-aranĝoj en Francio. Inter ili rumanoj partoprenis la Ekumenan E-Kongreson en Nantes, la UK-on kaj ILEI Konferencon en Montpeliero.

Por la unua fojo mi partoprenis religian kongreson esperantistan. Mi nepre devas substreki laŭdindan organizadon, kiun efektivigis Philippe Cousson. Li atente zorgis pri ĉiuj aferoj, klare kaj koncize agis, kaj ni ŝuldas dankojn al li, ĉar multe helpis nin por partopreni la kongreson. La aranĝo pruvis ke oni povas fari ne nur sciencon, arton esperante, sed ankaŭ religion. Dum la aranĝo estis pruvita, ke la lingvo bone funkcias. Iun tagon venis la momento, kiam la rumana grupo devis kontribui iom kaj iel al la programo. Se albano informis nin pri terura komunismo, se kroatino rememoris pri nacia futbala teamo (kiu bonege evoluis dum sia unua partopreno en Monda Ĉampioneco, n.r.), mi pensis, ke plej taŭga estas konigi iom da rumana kulturo. Pro la fakto, ke la religio kunigis nin en Nantes, ni komencis per rumana kanto, kiu estas kantata en la monaĥejoj kaj preĝejoj dum la Fasto de Sankta Maria (1-15-an de aŭgusto). Sekvis la balado "Ŝafideto", simbolo de nia kulturo kaj filozofio de la vivo kaj morto. Poste ni parolis pri nia genia poeto Mihai EMINESCU, mallonge pri sia verko, kaj ni kantis la melodion "Kial vi ne venas?", kies versoj apartenas al li. Ni daŭrigis la programon kantante "Paŝtisto kun 300 de ŝafoj", kaj fine samlandanino Maria SECULA deklamis siajn proprajn esperantistajn poemojn. Mi devas konfesi, ke laŭ la atento de la grandokulaj ĉeestantoj, ili sentis grandan intereson por nia programo kaj mi kredas, ke ili kunportis hejmen "ion" rumanan, ion memorindan. Aliflanke mi sentis inter ni la rumanoj (el Baia-Mare, Oradea kaj Timisoara), veran kunlaboron, ĉiu havis ideon, proponon, ĉiu strebis por nia celo. La lingvo funkcias, la partoprenantoj kunlaboras, do estiĝis vera Esperantujo! Domaĝe, ke oni mokis la ortodoksajn pastrojn, ĉar tiam estis momento kiam la ekumena kaj ankaŭ Esperanta sinteno, ĉiu devintus regi nin, forflugis. Se oni organizos la Ekumenan Kongreson en Rumanio en 2001, mi demandas min, ĉu la katolikoj kaj la protestantoj estos pretaj kunlabori kun la ortodoksoj? Povas esti, ke dum kelkaj jaroj mi kapablos respondi al mi mem, kaj mi esperas, ke la respondo estos jesa!

Rilate al la UK, kiel komitatano mi povas informi vin, ke nia prof. I. F. BOCIORT iĝis honora membro de UEA, rekompence pro sia longdaŭra E-agado.

Dum la Internacia Vespero ni feliĉe kaj fiere aŭskultis nian samlandaninon Valentina NAN (el Baia-Mare), kiu kune kun siaj ĝemelaj gefiloj Ioana kaj Ionut mirinde kantis esperante kaj ni aŭskultis ankaŭ la Internacian Ĥoron, kiun partoprenis nia ĉiama muzikgvidantino prof. Olimpia GUIU.

Aurora BUTE, TIMISOARA

## ŜAFIDETO

Sub la montar' neĝplena,  
En la pord' Edena,  
Vida venas voje,  
Vale vagas ĝoje  
Tri ŝafaroj kunaj,  
De tri viroj junaj:  
Unu: moldovan',  
Dua: transilvan',  
Tria: vranĉean.  
Aŭ du: vir' kun viro  
Flustras en konspiro:  
Se la nokto venos,  
Ili vivon prenos  
De l'ŝafist moldova  
Riĉe pleje pova,  
Kaj akiras povon  
Por aĉeti bovon,  
Kaj ĉevalojn saĝajn,  
Hundojn grandkuraĝajn. (...)

Ŝafidet ' amata!  
Estu nun kompata!  
Ne malkaŝu vorte,  
Ke mi kuŝas morte.  
Diru min feliĉa  
Pro edzigo riĉa  
Al knabino ranga,  
Rava, reĝosanga,  
Sed ne diru, ĉarma,  
Al patrino larma,  
Ke la nupto stelo  
Falis el ĉielo,  
Gastoj de festeno  
Estis pin', frakseno,  
Popoj: montopintoj,  
Kaj la muzikintoj,  
Estis birdoj mil',  
Torĉoj: stelo bril'.

Elromanigita de  
Kolomano KALOCSAY

## ADRESSANĜO

**S-inoBAJKA Katalin** ŝanĝis sian adreson. Nun ŝi loĝas ĉe suba adreso:

Mihai Viteazul 2/3 B.15., RO-4000 SFÂNTU-GHEORGHE,  
RUMANIO

## EPIDEMIAJ MALSANOJ EN LA DUDEKA JARCENTO

Malgraŭ de la progreso en la medicina scienco, la epidemiaj malsanoj estas grava problemo je la fino de la dudeka jarcento. La antibiotikoj kaj vakcinoj estas nuntempe efikaj iloj preventi kaj kuracadi la epidemiajn malsanojn, tamen dum la lastaj jardekoj aperis pli novaj epidemiaj malsanoj kaj reaperis kelkaj malnovaj jam konataj malsanoj, kiuj estas rezistecaj nun por la terapio, ĉar la vakcinoj kaj antibiotikoj iĝis senefikaj preventi aŭ kuracadi tiujn. Ni mencias la tuberkulozon, malarion, ĥoleron, Dengue-febron, difterion kaj bubonopeston. Dum nia jardeko pli ol 30 milionoj da homoj mortos en tuberkulozo pro la antibiotikaj rezistenco. La malario-parazitoj estas rezistecaj kontraŭ de kuraciloj kaj la kuloj, kiuj disvastigas la malarion iĝis rezistecaj por la insekticidoj. La ĥolero mortigas ĉirkaŭ 120.000 homojn en ĉiu jaro precipe en Afriko. La Dengue-febro, kiun disvastigas la kuloj, kaŭzis gravan epidemion en 1995 j., precipe en 14 landoj de Latina Ameriko. Ekde 1990 estas difterio-epidemioj en 15 landoj de Orienta Eŭropo. En 1995 raportis 1400 kazojn de bubonopesto, kiu disvastiĝas precipe en USONO.

La epidemiaj malsanoj kaŭzas la plej multajn mortadojn inter la malsanoj. En 1996 pro epidemiaj malsanoj mortis ĉ. 50 milionoj da homoj. La Mondsana Organizo redaktis eldonajon "The World Health Report 1996" kiu atentigas pri la minaco de la epidemiaj malsanoj, kiu kaŭzas mondsanan krizon, ĉar ne ekzistas lando, kiu estas en sekureco.

La epidemia meningito estas kuracebla, tamen en 1996 mortis en Afriko 15.000 homoj pro la malriĉeco. La pneŭmonio en ĉiu jaro mortigas 4 milionojn da homoj, precipe la infanojn. La morbilo mortigas unu milionon da infano kaj la pertuso 355.000 infanojn ĉiu jare, kiujn povintus preventi per malmultekostaj medikamentoj kaj vakcinado. Ĉiutage mortas 8.000 infanoj pro la diareo, kiun povus preventi pere de bona higieno, trinkakvo kaj medikamentoj. La plej multa mortado estas en la malriĉaj, malevoluantaj landoj, kie ĉ. 800 milionoj da homoj ne havas eblecon por la sanitara prizorgado.

Nuntempe oni identigis pli novajn epidemiojn, malsanojn. Laŭ raporto de Mondsana Organizo: "Dum la pasintaj 20 jaroj aperis almenaŭ 30 novaj malsanoj, kiuj minacas la sanon de la homaro. Inter tiuj troviĝas multaj kiujn oni ne povas sanigi, ĉar mankas la konvena terapio aŭ preventi ilin pere de vakcinado". La HIV-on, kiu kaŭzas

AIDS-on antaŭ de okdekaj jaroj ankoraŭ oni ne konis, sed nuntempe ĉirkaŭ 30 milionoj da homoj estas infektitaj, inter kiuj pli ol 5 milionoj mortis aŭ suferas en AIDS. Laŭ Human Development Report 1996, en Eŭropo kaj Norda Ameriko nun la AIDS kaŭzas la plej grandan mortadon, kaj ĉ. 6.000 homoj ĉiutage infektigas.

Faktoroj, kiuj favoras por la mikroboj:

Nuntempe kreskas la nombro de la loĝantaro en la grandaj urboj. El la monda loĝantaro antaŭ 100 jaroj nur 15% vivis en la urboj, sed laŭ la prognozaj en 2010 jaro la duono de la monda loĝantaro vivos en la urboj. La mikroboj disvastiĝas kaj plimultiĝas pli facile en la urboj, kie la loĝantaro estas densa. Se la higienaj kondiĉoj estas bonaj, tiuj malhelpas la disvastiĝon de la epidemiaj malsanoj. En la malriĉaj landoj la higienaj kondiĉoj estas malbonaj, sekve pli facile disvastiĝas ankaŭ la epidemioj. Laŭ la revuo Archives of Internal Medicine, kie estas malriĉeco kaj malevoluanta ekonomio disvastiĝas pli facile la epidemiaj malsanoj.

La trafiko havas gravan rolon, ĉar milionoj da homoj vojaĝas trans la landlimoj, kiam kunportas ankaŭ la mortigajn mikrobojn.

La ĵurnalo The Journal of the Medical American Association atentigas pri la danĝero "se ie eksplodas epidemio, tio minacas ankaŭ aliajn landojn, precipe tiujn, kiuj havas rolon en la internacia trafiko."

Okaze de Internacia Kongresa Universitato (IKU) en Montpeliero 1998, d-ro José Antonio Vergara, specialisto pri epidemiologio, klarigis "ke nun kiam epidemiaj malsanoj de la pasinteco ŝajnas malaperintaj, la homaro ofte mem kreas vivterenon por antibiotiko-rezistaj bakterioj per ekonomiaj kaj ekologiaj ŝanĝoj, kiujn ĝi kaŭzas.

La nuntempa medicino, helpe de esploro devas fari ĉion por preventi kaj kuracadi la epidemiajn malsanojn, kiuj minacas la homaron je la sojlo de la tria jarmilo!

### *Resumo*

La aŭtoro atentigas pri la kialoj kaj faktoroj, kiuj favoras la disvastiĝon de la malnovaj, reaperintaj kaj la novaj epidemiaj malsanoj aperintaj dum pasintaj 20 jaroj. Tiuj signifas grandan danĝeron por la homaro, ĉar minacas homan sanon je la sojlo de la tria jarmilo.

d-ro LÁZÁR Gábor, COVASNA

## KORESPONDI DEZIRAS

Grupo de komencantaj geesperantistoj (5 diversagaj personoj inter 12-55 jaroj) deziras korespondi kun eksterlandaj geesperantistoj. Skribu al la grupestrino: SZÁSZ Lenke, RO-4174 PRAID nr-o 130, jud. HARGITA, RUMANIO.

Mi estas bestkuracisto, mi havas familion, mi kolektas monerojn kaj sportmarkojn, min interesas la popolkutimoj. Mi okupiĝas kun Esperanto ekde 1989. Mi serĉas leteramikojn el Rumanio aŭ Bulgario. Mia adreso estas: Leo LOKOTAR, SARGVERE, MÄEKULA SJK 72-602 JÄRVAMAA, ESTONIO.

Pro la donace senditaj libroj por la Pruntlibraro, la Redakcio de BAZARO dankas al:

SZÁSZ Lenke, PRAID, 22 libroj;  
 ESPERANTO-MUSEUM, VIENO, 4 libroj;  
 Francis BOURGAUX, BRUSELO, 6 libroj;  
 SZÚCS Iréné, ORADEA, 22 libroj;  
 SPIRITA ELDONA SOCIETO LORENZ,  
 RIÓ DE JANIERO, 1 libro;  
 Anna RÄU-LEHOTSKÁ, 5 libroj.

## BAJK KAJ LANDA KONGRESO DE RumEJA

Inter la 18-an kaj 20-an de septembro 1998 okazis en Timisoara la 3-a Landa Kongreso de RumEJA (Rumania Esperantista Junulara Asocio). Samtempe kaj samloke okazis laborkunsido pri Balkana Junulara Konferenco (BAJK). La kongreson partoprenis ĉ. 20 gejunuloj el Cluj-Napoca, Craiova, Sibiu, Baia-Mare, Satu-Mare, Viseu de Sus kaj reprezentantoj el Serbio.

Ni komencis kun BAJK - la renkontiĝo de la reprezentantoj de la Balkanaj Esperantistaj Organizo, okazanta ĉiujare. Bedaŭrinde partoprenis nur la reprezentantoj de SerBEJO (Serbia Esperantista Junulara Organizo), kaj naskiĝis demando: "Ĉu necesas BAJK?". Ni konsentis, ke por pli efika pleniĝo de la agado oni devas ankaŭ vojaĝi. Gejunuloj ĉefe ne havas multe da rimedoj, ne nur ĉe ni, sed tre gravas, ke oni partoprenu internaciajn renkontiĝojn kaj vojaĝu eksterlanden. Oni ja ne lernas fremdajn lingvojn por paroli kun la samlandanoj. Do la

rezulto estis, ke BAJK tamen necesas por havi eblecon organizi komunajn internaciajn agadojn - ne nur E-kursojn.

Dum la laborparto de la kongreso ni elektis novan estraron (prezidanto estas Mirela FRANTESCU el Timisoara), oni prezentis raporton pri la laboro dum la pasinta jaro kaj la planon por la venonta jaro. Indas aldoni, ke la kongreson finance subtenis la Ministerio pri Junularaj Aferoj, kaj la Televidstacio el Timisoara prezentis reportaĵojn pri la evento. Kompreneble krom la seriozaj diskutoj ni multe promenis kaj vizitis interesajn lokojn.

Por pli, da informoj pri RumEJA kaj la okazintaĵoj kontakti: RumEJA, str. Take Ionescu 10-16, SC. B, Ap. 29, RO-1900 TIMISOARA, RUMANIO.

Iuliana TRIFAN, SIBIU  
itrifan@vectra.sibiu.ro

### En la zorgo de Eldonejo DOKIA aperis tri libroj:

**Alti pasi în Esperanto** de Ionel ONET, 68 paĝa, formato A5, kiu enhavas Rumana - Esperanto vortaron, E-gramatikon, Rumanajn toponimojn en Esperanto kaj Rumanan Esperantistan Bibliografion. Prezo: 8000 leoj+sendokostoj.

**Documente Esperanto** (volumo I kaj II) de Ionel ONET kaj Sasha VLAD, en rumana lingvo, 38 respektive 50 paĝa, formata A5, antologio dediĉita al 110 jariĝo de lingvo Esperanto kaj al la 80-a datreveno de la morto de Zamenhof. Prezo: po 4000 leoj+sendokostoj.

Ĉiuj tri libroj estas mendeblaj per remburso ĉe: *Radu CRETU*  
str. Padin 28/19, RO-3400, CLUJ-NAPOCA, RUMANIO

## NOVAĴOJ

### REA kaj RumEJA kunlaboros

Dum la kongreso de RumEJA oni decidis, ke esperantistoj junaj kaj la malpli junaj kunlaboros por eldoni (finfine!) E-Infomilon. Sekvas la decido pri la titolo, enhavo, ktp. Ni esperas, ke la entuziasmo kaj emo por agi feliĉe kaj efike kunplektiĝos kun la sperto.

Aurora BUTE, TIMISOARA



La 13-an de decembro, je la 12-a horo, en la Kluĵa Unitaria Paroĥa Konsilejo (str. BRASSAI Sámuel nr.6) oni inaŭguros la bildkart-ekspozicion kun la titolo: LA PLEJ BELAJ PREĜEJOJ DE LA MONDO, kie estos eksponitaj pli ol 400 bildkartoj el pli ol 40 landoj.

Ĉi okaze, mi volas elkore danki al ĉiuj esperantistoj kiuj sendis al mi bildkartojn kaj helpis min organizi ĉi-tiun ekspozicion.

'SIGMOND Júlia, CLUJ-NAPOCA

Okaze de la Internacia Festivalo pri Farĉita Brasiko, en septembro, TRANS-TUR S.R.L. (turisma agentejo) en Praid permesis al mi aranĝi ekspozicion el turismaj prospektoj diverslandaj en la salono de la hotelo.

SZÁSZ Lenke, PRAID

## OPINIO PRI MALESPERANTISTOJ

Tre multaj homoj plej honestaj,  
Virtemaj, decaj kaj modestaj.  
Estas krudmane forpelitaj  
De orgojluloj gloriavidaĵ!  
(El Norda Prismo)

En BAZARO nr-o 3(6) mi legis en la artikolo sub la subskribo de f-ino Iuliana TRIFAN pri la kongreso de AFER okazinta en aŭgusto 1998 en SIBIU.

Samideano Ioachim GIESSNER kiu partoprenis tiun kongreson en Sibiu de "Rumania Fervoĵista Esperantista Kongreso", estas malnova amiko kaj samideano de nia lando, kaj mi mencias, fiere, ke li estas mia malnova persona amiko, kaj amiko de la membroj de la Fervoĵista Esperantista Rondo, la unua organizajo de fervoĵistaj Esperantistoj en nia lando. Samideano GIESSNER estis plurfoje ŝatata gasto de braŝovaj Esperantistoj en Braŝovo, antaŭ la revolucio de decembro 1989. Li ne perdas la okazon viziti Braŝovon kiam li estas en nia lando.

Post lia partopreno en Sibiu, amiko GIESSNER venis ankaŭ al Braŝovo, do ni ambaŭ profitis tiun okazon por interŝanĝi opiniojn. Bedaŭrinde tiu-ĉi sincera kaj vera homo de imitinda karaktero, forlasis la kongresan urbon kaj nian landon, kun la koro farĉita de amareco. Mi kredas, ke la estraro de AFER, kaj ĉiuj membroj de ĝi, la honestaj homoj kiuj sinkredas esperantistoj, rajtas scii kio okazas en ilia organizajo, kiu

problemon: de eksterlando mi ricevis avertojn kritikajn pri la kondutmaniero de la fervojistoj rumanaj, kiuj aliĝis al IFEF-Kongresoj.

La eksterlandaj Esperantistaj fervojistoj konas min kiel fervojisto: pro tio ili kredas ke mi estas membro de AFER, tiu estas la kialo pro kio ili turnas iliajn plendojn al mi, por ke mi agu por la evitado de la venontaj tiaspecaj malagrablajoj. Fakte kion anoncas la fervojistaj organizantoj de IFEF-Kongresoj? Unue ili asertas, ke preskaŭ ĉiuj AFER-anoj kiuj aliĝas al IFEF-Kongresoj ne kapablas almenaŭ unu frazon prononci en Internacia Lingvo; due ili ne partoprenas la kunsidojn programitajn por analizi diversajn fervojajn problemojn, kaj eĉ pli grave, ili kondukas ekster la normoj de la moralo kaj civilizo, kvazaŭ veraj "invadantoj".

Por helpi la AFER-anoj ellerni la lingvon, kaj por analizi la manieron je kiu ni povas forigi tian malsatatan, damnindan staton, kiu damaĝas al nia reputacio kaj eĉ al la imago de la lando. Ni, la membroj de REA filio de Braŝovo, etendis la manon por helpi ilin, sed ili ignoris nian bonvolemon. Pro tio mi denove anoncas ilin, ke la mano etendita restas ankoraŭ preta helpi ilin. Krome mi, kiel estinta fervojisto apelacias al ĉiuj AFER-anoj, precipe al tiuj, kiuj okupas altrajn postenojn: "Estas pli facile detrui ol konstrui!" GIBSSNER ne estas esti viktimo de la senkonscienco de iuj, kiuj celas nur por profiti pri la avantaĝoj de Esperanto.

Ni atendas alvokon de AFER-anoj, kiam kaj kie ni povas analizi la aferon kaj kiel agi por fariĝi ni Esperantistoj, sed ne turistoj damaĝantaj al IDEO de Esperanto!

Ion SÂRBU, BRAȘOVO

Bedaŭrinde ekzistas "Esperantistoj" kiuj volas nur profiti de IL-o. La fakto, ke tiaspecaj fihomoj povas amase partopreni diversajn, precipe eksterlandajn E-kongresojn, estas ankaŭ nia peko, de la pli aŭ malpli veraj Esperantistoj, ĉar per nia helpo ili povas atingi iliajn celojn.

Estus nenia problemo se kelkaj estroj de la Societo de Rumanaj Fervojoj, kiuj ne parolas Esperante, partoprenas E-kongresojn eksterlande, ĉar tiamaniere "helpante" ilin, la E-movado ricevas ilian apogon, sed estas damninda faciligi al iuj personoj, neesperantistoj la akiron de la vizo por okcidenteŭropaj ŝtatoj.

Kial ni faru tion? Tial, ke ili per ilia sinteno faru kontraŭreklamon por la rumaniaj Esperantistoj kaj E-movado? La plejmulto de ĉi-tiuj fiuloj ne estas dankemaj al Esperantistoj eĉ ili

kondamnas nin. Ili eĉ ne estas la t.n. simpatiantoj de la E-movado, nur ĝiaj profituloj. Kondamnindas, ke multaj enlandaj geesperantistoj, kontraŭ persona profito, faciligas al tiaspecaj homoj profiti de la avantaĝoj de esperantisteco.

Mi proponas, ke por eviti tiaspecajn incidentojn, la Internaciaj Esperantaj Instancoj nur al tiuj sendu oficialan invitilon, por kiuj antaŭe, konata kaj honesta Esperantisto surprenas la respondecon.

Karaj legantoj, ni atendas viajn reagojn je la supra artikolo kaj viajn proponojn por solvi ĉi-tiun problemon! Antaŭdankon!

KOLOZSVÁRI Zsolt, CLUJ-NAPOCA

### ALVOKO!

Fondiĝos organizajo - post nelonga tempo - kun nomo "Astrologia Esperantista Societo". Mi serĉas kontaktojn kun tiuj, kiuj okupiĝas pri astrologio, aŭ interesiĝas pri la temo, kaj tial volonte partoprenus en la laboro de la nova societo. Horoskopopretigado.

Mi petas la legantojn, se ili konas astrologojn esperantistojn, bonvolu informi ŝin/lin pri nia alvoko.

D-ro NAGY Róbert, profesoro pri astrologio  
 H-1061 BUDAPEST, Köztársaság tér 16. V.em. 16., HUNGARIO  
 Retpoŝto: AstroEsp@dpg.hu

### CIRKULERO

Kiel promesite en majo, inter 19-an kaj 20-an de decembro 1998 okazos Tutlanda E-Seminario en Braŝovo.

Mi ŝatus, ke la seminario estu serioza kaj altnivela, pro tio mi invitas ĉiujn, kiuj instruas Esperanton gvidi unuhoran kurson aŭ prezenti ion interesan (5-10 min) tekston, gramatikajon, libron, ktp., ion kio povus atentigi nin, kaj plibonigi nian lingvon aŭ parolkapablon.

Mi prezentos tekston, kiun mi proponas pritrakti kaj iomete komentikaj ekzercoj. Ni ne forgesu ke je la 15-an de decembro ni festas la naskiĝtagon de Zamenhof. Ni devas rigardi ankaŭ la estonton, ni kantas Kristnaskajn kantojn kaj diskutos pri la organizaj aferoj.

La tranoktado kostas 15.000 leojn por unu nokto. Prizorgu pri via manĝaĵo! Cetere ni ekskursos senpage al Poiana Brasov kaj aŭ Kastelo Bran. La regiono estas belega dum la vintro, mi invitas vin veni kaj ĝui la vidindaĵojn, la neĝon kaj la E-etoson.

Ni povas loĝigi maksimume 25 personojn, pro tio mi petas vin nepre anonci vian partoprenon telefone (056-145764) aŭ perpoŝte Aurora BUTE, str., Brândusei nr.6, Sc. C, Ap.1, 1900, TIMISOARA.

La provizora programo estas la jena:

### SABATE

- 9.00 -Malfermo  
 -Tekstprilaborado (Aurora BUTE)  
 11.30-15.00 -Ekskurso perbuse al Poiana Brasov  
 16.00-19.00 -Mihai CONSTANTINESCU  
 -Komprenekzercado helpe de kasedo (A. BUTE)  
 -Kristnaskaj kantoj

### DIMANĈE

- 10.00-13.00 -Zamenhofa-tago (Dorin HEHN)  
 -Gramatikajoj (Maria SEKULA)  
 -Emil CRĂNCĂU  
 -Aliaj  
 -Organizaj problemoj

Ni invitas ankaŭ reprezentantoj de aliaj E-Asocioj.

Esperanto estas ponto inter popoloj, kial ne estu ankaŭ inter ni?

Aurora BUTE, prezidantino de EAR

## ĈIO ESTAS BONA!

Nuntempe kiam multaj homoj estas agaciĝintaj pro amasoj da problemoj, tiu aserto eble ŝajnas esti tro optimisma aŭ malreala. Tamen la Kosmologio de Martinus per argumentoj pruvas la justecon de ĉi-tiu aserto.

Ĉiu-jare, ĵus post UK okazas en Klint, Danio la E-Semajno. En la Martinus Centro la gastoj povas aŭskulti prelegojn, labori en studgrupoj, partopreni en la Esperantlingva instruado.

Ĉi-somere mi havis bonŝancon ĝoji la gastigadon de la Martinus Centro, kune kun la aliaj geesperantistoj el Danio, Ĉeĥio, Japanio, Germanio, Hungario, Rusio, Svedio kaj Venezuelo. Ni ĉiuj ĉeestis tie por studi la kosmologion, por ricevi klarigon pri la simboloj de Martinus, por kompreni la kompleksan interrilaton de al Universo, sed la plej grava helpo estis, kion ni ricevis por ŝanĝi nian pensmanieron, por fariĝi netuŝeblaj de maloj. Kiel?

La Kosmologio de Martinus neas la nocion de "malbono", kaj parolas nur pri la agrabla kaj malagrabla bonoj. Ĉar kvankam ŝajnas al mi kontraŭe, ĉio estas por nia avantaĝo. Ni devas esti dankemaj al Dio

pro ĉio, eĉ pro la suferoj, ĉar kiel ĉio alia en la vivo, la sufero havas bone definitan sencon. Ĝi estas destinita peri nian evoluon.

Je la unua legado ĉi-tiuj vortoj povas ŝajni dogmo, sed la Kosmologio per kosmaj analizoj oferas verojn kaj leĝojn por inteligentaj, pensantaj homoj pri ĉiuj fenomenoj de la vivo.

En Klint mi ĉeestis kun personoj kiuj de longa tempo agadas, vivas laŭ la principoj de Martinus, kaj ilia saĝeco, humaneco, toleremo kaj amkapablo vekis en mi la sopiron al tia mondo, kie anstataŭ kolero kaj malpaco regas amo.

SOFINETI Ēva, Baia-Mare

Aperis la libro DRAKULA de Ioan SĀRBU. Krom la konciza biografio de Drakula, ĝi enhavas ankoraŭ dek noveleojn tradukitajn el la rumanlingva literaturo.

Ĝi mendeblas ĉe Ioan SĀRBU, b-dul 15 Noiembrie 92, sc.C, ap.8, RO-2200 BRASOV, RUMANIO

## OPINIOJ, KONSILOJ, KRITIKOJ, PROPONOJ

### Karaj bazaraj gevendistoj!

Mi ĉiam estos aĉetantino de viaj varoj. Ekde la naskiĝo de BAZARO mi sekvas ĝian pluvivadon, evoluon kun amoplena atento. Preskaŭ mi observos karan, ekzotikan floron, el pli varmaj landoj, kiu kreskas nun ankaŭ en nia tre varma klimato. Vivu ĝiaj bredistoj!

Kaj ni, karaj gesamideanoj, helpu ilian sindoneman, tre laŭdindan laboron laŭ niaj eblecoj, eĉ se modestaj. Ĉiu homo, eĉ la plej soleca, havas almenaŭ unu amikon. Ni varbu estontajn geesperantistojn! Ne hontu pro via esperantisteco. Kiu hontas kaj kaŝas ĝin, tiu ne estas vera esperantisto.

Mi tre amas ĉi-tiun modestan BAZARO-n, ĝi estas pli proksima al mia koro ol la luksaj "super-marketoj", ĉar ĝi estas NIA kaj ĝi pluvivas ĈI TIE, dank' al NI, ĈIUJ! Abonu do, abonigu ĝin.

SZÁSZ Lenke, PRAID

## NI PAROLU KAJ SKRIBU ĜUSTE KAJ AKURATE

Partoprenante diversajn esperantistajn kunvenojn, mi observis ke multaj gesamideanoj parolas sufiĉe erare kaj malĝuste. Precipe okaze de la enlandaj renkontiĝoj, multaj el inter ni miksas inter la Esperantaj vortoj ankaŭ rumanajn esprimojn, kiuj plurfoje restas

neobservataj pro la komuna deveno de la granda parto de la du vortrezoroj. Sed ĝis kiam dum la prelegoj, alparoloj oni ne rimarkas ĉiujn, okaze de la legado, la eraroj estas pli facile observeblaj kaj analizeblaj. Mi deziras nenion ligi al pilorio, sed por plibonigi la nivelon de nia lingvoscio - parolado kaj kompilado - mi helpintence atentigas la skribemajn gesamideojn pri la plej oftaj eraroj. La ekzemplojn mi trovis en diversaj enlandaj esperantistaj revuoj, dokumentoj, ktp.

La plej ofta estas la eraroj de la akordigo de la substantivoj kaj adjektivoj en pluralo kaj akuzativo, la uzado de la substantivoj post tranzitivaj verboj, ktp.

Bedaŭrinde multaj nomoj aperas malĝuste, kiel ekzemple Sovjetunio ĝuste estas Sovetunio aŭ Canale Grande estas Canal Grande - itale aŭ La Granda Kanalo - Esperante. La statuon de Michelangeo oni rebaptis Pieto. Aŭ ĉu ni akceptas la originalan nomon - La Piéta aŭ esperante ĝi estas Pietato. Ĝena povas esti, precipe por la eksterlandaj legantoj la senkonsekvencan uzado de la nomoj de urboj, vilaĝoj, montoj, personoj k.a. Jen kelkaj ekzemploj: Sucevita, preĝejo Zamca aŭ Cernăuți legate laŭ la reguloj de IL-o ne similas la originalajn rumanajn nomojn. Bone estus alkutimiĝi, eĉ postuli ĉiam skribi post la nomo la fonetikan prononcadon, kiel ekz. Ilisestî (Iliseŝt), Iasi (Jaŝ). La propono estas valida ankaŭ por la nomoj de personoj, kiel Eminovici (Eminoviĉ), Slavici (Slaviĉ) ktp. Rilate la personajn nomojn estas dezirata respekti la E-an vicordon de la persona kaj familia nomoj (Kálmán KALOCSAY kaj ne KALOCSAY Kálmán). Ĉar, laŭ la reagoj, la revuo estas legata ankaŭ trans la limoj de Rumanio, estus bone klarigi diversajn specifajn, lokajn nomojn. Ekz. la societo Junimea aperis en du artikoloj tiel simple aŭ tradukite kiel Junulara Rumana Societo. Ĉu ankaŭ eksterlande oni parolas pri la sama organizajo? Mi proponas kiel solvon: Junimea (Junimea = junularo, iama rumana junulara societo).

Kelkaj ekzemploj de fremdaj vortoj trovitaj en E-aj tekstoj: "pedoklimataj faktoroj", "via prezento estas importanta" (la teksto rilatas al neniun prezento aŭ prezentado), "importantaj invituloj" (nek en tiu ĉi frazo oni rilatas al komerca agado esprimata de la vorto importi kaj ankaŭ la invituloj estas erara. Laŭ PIV, -ul: Suf. signifanta individuon, personon karakterizitan per tio, kion esprimas la radiko. Do, nia invitulo ĉu invitas iun aŭ estas invitata?).

Oni ne respektas ĉiam la regulon de la sufiĉo kaj neceso. Tio estas valida tiel por la sufiksoj kaj prefiksoj kiel por diversaj partoj de

la frazoj. Ekzemple superflua estas la sufikso -iĝ en la esprimoj “la nombro de la lingvoj malkreskiĝas” kaj tranoktiĝo (pli ĝuste tranoktado). Same ne necesas la sufikso -ulo krom la jam menciita ekzemplo en “Stefano la Grandulo”, anstataŭ kio, laŭ la Plena Vortaro devas uzi la vorton “la Granda”. Troiĝe abunda ŝajnas la esprimo “nepre estas absolute necesa”. Nu, nepre kaj absolute estas sinonimoj, eĉ PIV difinas la vorton nepre tiel “tute inevitablea absolute necesa”. En diversaj skribaĵoj mi trovis ege longajn denombradojn. Jen la plej timiga ekzemplo: “... por nia disvolviĝo kulture, profesie, amike, turisme, afere, junule, organizite, informe”.

La mala situacio estas la manko de vortoj aŭ de eroj de la frazoj, propozicioj, kiel: “Devus enhavi diversajn eniginojn, ŝercojn...” Kio aŭ kiu? La revuo, ĝi ktp. Alie mi legis: “Salutis nin en Esperanto Papo Johano Paŭlo la dua. Ni ekstaris kaj kriis.” (Stranga kutimo ekstarti kaj krii.) Kion oni kriis? Feliĉe ankaŭ mi ĉeestis kaj mi povas respondi: Vivu la Papo! Krome la Sankta Patro meritis la honorigan titolon Lia Moŝto, precipe, ke la sama artikolo titolis la respublikan prezidanton ekscelenco.

Sur aliĝilo por “nacia altranga ARANĜO kun internaciaj partoprenoj” ni povas legi “la lokoj limigitaj”. Verŝajne la lokoj estas aŭ estos limigitaj. Ĉu ne?

La troa mallongigo povas rezultigi sensencajn, mis- aŭ malkompreneblajn tekstojn. Kiel “La Eŭropa ŝtrando, kie ni havis eblecon aŭskulti interesajn prelegojn kaj iomete somerumi, kaj havi la surmaran krozadon (nokta banado...)”. En la citata formo, la frazo estas ridetiga. Mankas el ĝi kelkaj klarigaj vortoj. Tiel havas alian sencon: En Rimini, kies plaĝo nomiĝas ankaŭ Eŭropa strando, ni havis...

Aperis ankaŭ kelkaj pritemaj eraroj, miskomprenoj, kiel la supre menciita krozado aŭ ke Oradea troviĝas je 1564 km-a distanco de Vieno (fakte je nur 500 km-a distanco). Gravan eraron enhavas artikolo pri la kalendaroj, kiu asertas ke ĉe ni estas ankoraŭ valida la Julia kalendaro. Laŭ miaj modestaj scioj, tion dum la XIII. j.c. anstataŭis la Gregoria kalendaro, kiu nun estas oficiala en tuta Eŭropo. Nur la grek-ortodoksa eklezio kalkulas la daton de Pasko kaj sekve de Pentikosto laŭ la Julia kalendaro. Misinformiga estas ankaŭ la sciigo pri la Aloo, kiu “estas aĉetebla en preskaŭ ĉiuj apotekoj kaj florvendejoj”. (Dum mia ĉ.35 jara farmacia praktiko mi nenie observis vendante florojn aŭ kreskajojn.) Aliloke la tradukaĵoj eraras: la Instituto Madonna del Carmine aperis kiel Dipatra Instituto.

Alia “peko” de la kompilantoj estas, ke foj-foje ili ne havas la

“internan forton” tranĉi, dispecigi siajn frazojn. En iu ĉi-jara cirkulero mi trovis frazojn de 6-8 tajpitajn liniojn. Eĉ en unu la redaktisto perdis la vicon de siaj ideoj kaj la tri temoj de la ege komplika frazo havas nenian ligan inter ili. Same mi trovis unufrazan artikolon havante 14 tajpitajn liniojn. Re kaj relegante tion mi konstatis, ke dividite la menciitan skribadon en 5-6 pli mallongajn frazojn ili certe estus pli kompreneblaj.

Karaj gesamideanoj, la presajoj, diversaj multobligitaj materialoj estas la spegulo de nia lingvoscio. Tial antaŭ sendi la manuskriptojn al la redaktistoj aŭ dissendi ilin, ni havu la paciencon denove tralegi kaj senerarigi ilin. Eĉ laŭ mia sperto, tute ne estas hontinda afero kontroli la skribadon ankaŭ helpe de vortaro aŭ lingvolibro. Aliflanke la redaktistoj, eldonistoj ekzercu ilian rajton, eĉ devon, senerarigi la skribaĵojn el gramatika, lingvo-ĝusteca vidpunkto aŭ jus mallongigi ilin, se tio estas bezonata.

Se ni dezirus helpi la disvastigon de Esperanto, nia kontribuo povas esti paroli, kompili, skribi kompreneble, ĝuste, akurate.

Stefano BUDAĤAZY, ORADEA

Elkore ni dankas al vi pro via helpintenca letero. La plej multo el viaj rimarkoj estas ĝustaj. Bedaŭrinde nur malmultaj homoj parolas kaj skribas perfekte, malgraŭ la fakto, ke oni diras (kaj tio veras): la Internacia Lingvo Esperanto estas la plej facila lingvo en la mondo!

Konstante ni klopodas senerarigi, kelkfoje mallongigi la artikolojn kiujn sendas al ni niaj kunlaborantoj. Ankoraŭ ni ne estas tiom lertaj, kaj tiel ne ĉiam ni sukcesas tion, pro la manko de tempo aŭ de pacienco. Tial ni petas la pardonon de niaj karaj legantoj pro la misskriboj kaj lingvaj eraroj.

Koncerne la skribadon de la nomoj de personoj, kiel vi povis observi, ĉiam ni skribas ilin unuece. Respektante la nacian sinsekvon de la persona kaj familia nomo, ni ĉiam skribas per majuskloj la familian nomon. Mi kredas, ke estas superflue skribi post ĉiu nomo sian fonetikan transskribon. Preskaŭ nenie en la neesperantista gazetaro mi observis tion. Mi supozas, ke niaj legantoj estas tiom kleraj, ke ili povas ellegi tiujn nomojn.

Cetere la fonetikan transskribon de nomoj de geografiaj lokoj, ĉiu povas trovi en preskaŭ iu ajn geografia atlaso. (Neniam mi vidis en skribaĵoj, ke oni ekspliku, ke Beijing legindas simile ol Pejĉin aŭ Lódz legindas Uŭĝ).

Via rimarko pri aloo, ke ĝi ne troveblas en la apotekoj, pli ol certe ĝustas. Tiun artikolon ni elprenis el vegetarana revuo kaj mi eĉ ne



ĉubis pri tio, ke ĝi ne aĉetebblas en preskaŭ ĉiuj apotekoj, ĉar en mia infaneco ĉiam mi vidis tiun kreskajon en la tri plej proksimaj apotekoj de mia loĝejo, de kie mia avino multfoje eĉ aĉetis ĝin.

KOLOZSVÁRI Zsolt, CLUJ-NAPOCA

## PARTETO DE MIA ESPERANTO-AGADO

En januaro 1990 mi decidis reorganizi Esperanto-movadon en urbo Oradea. Tiam mi ne havis lokon kie okazigi renkontiĝojn, kie organizi kursojn de Esperanto, mi ne havis oficialan monon por tiu celo. Tamen mi havis ardan deziron kaj firman volon fari Esperanton en Oradea kaj mi faris Esperanton, ĉar "Kiu volas povas" (ZAMENHOF).

En mia domo mi invitis kelkajn geesperantistojn kiujn mi konis, kaj mi parolis al ili pri mia intenco, pri mia projekto. Tri tagojn poste, la lernejo nr-o 14 disponigis al ni lernoĉambron por Esperanto, dank' al mia juna amiko inĝ. Aleksandro VARGA.

En la dua parto de januaro 1990 mi organizis la unuan oficialan kurson de Esperanto, kiu finiĝis en junio 1990 kun 39 kursanoj. En julio 1990 ni partoprenis landan Esperanto-kongreson en Timisoara kie nia delegacio el Oradea superis ĉiujn aliajn delegaciojn, unue pro la nombro de la partoprenantoj de iu loko (32 personoj) kaj due pro la programo prezentita de ni en kiu, la poemoj de ZAMENHOF kaj Antonina APOLLO deklamitaj de ĉarma knabino VARGA Noémi kaj de juna kaj tre talenta aktorino Mirela CORBEANU, ravigis la ĉeestantojn.

Je 15-an de septembro 1990 mi organizis la duan Esperanto-lingvokurson, kiu finiĝis en festa maniero en junio 1991, kiam la lernantoj ricevis mian personan donacon, la merititan diplomon. De tiam, dum la pasintaj sep jaroj, semajnon post semajno, jaron post jaro, la instruado de Esperanto senĉese daŭris en Oradea. Ne estis facile, ĉar en nia filio ne ekzistis lernolibroj. Mi pretigis lecionojn, kaj per tajpilo mi multobligis ilin, ke ĉiu lernanto havu studmaterialon. Kiel legajo, mi elektis el revuo El Popola Ĉinio kvin artikoletojn por komencantoj, per kopiilo mi multobligis ilin en 30 ekzempleroj, kaj mi uzis ilin dum la studhoroj.

Novajon mi enkondukis en mian instruadon: Dum la kurso por progresantoj, laŭ alfabeto ordo, ĉiu lernanto pretigis lecionon laŭ sia elekto, kaj li mem gvidis la respektivan studhoron. La metodo pruviĝis ege efika, ĉar tiamaniere aperis diverseco de ideoj, metodoj, imagoj, kiuj faris la studhorojn pli interesajn, allogajn kaj gajajn. La metodo

celis pensigi, laborigi kaj paroligi ĉiujn, samtempe ili ebligante kiamajn helpi aiiulon je la lernado de la lingvo.

En 1992 mi kondukis 16 membrojn de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) al Alba-Iulia kie fondiĝis IKUE-sekcio en Rumanio, dank' al Oradea, kiu havis tiam 20 membrojn el 32 laŭ situacio ekzistanta ĉe pastro Duilio MAGNANI, tiama prezidanto de IKUE. Ankaŭ tie ni prezentis la religian muzikon dum la Sanktaj Mesoj.

La 23-an de septembro 1992 ni akiris la juran personecon, do ni fariĝis memstara asocio.

Inter 15-an de junio kaj 6-an de novembro 1993 mi dediĉis la tempon al la instruado de Esperanto al juna romkatolika pastro Johano MAHAJDUDA kaj al kantoro LUKÁCS Endre por, ke povu partopreni la religiajn E-kongresojn en la mondo, sed ankaŭ tial, ke okaze de la malfermo de lernoĵaro 1993/1994, estu celebrata Sankta Meso en Esperanto. Tio okazis en romkatolika Baziliko, kie la partoprenantoj estis ege impresitaj ankaŭ pro la belegaj Esperanto-kantoj, prezentitaj de la koruso.

En la loka ĵurnalo "Bihari Napló" aperis artikoleto pri la evento, prezentita kiel premiero ne nur en Oradea sed en Rumanio, ĉar unuan fojon Sankta Meso estis celebrata de loka pastro en Esperanto. La subskribanto de ĉi-tiu artikolo bedaŭrinde forĝesis menciĝi la heroojn de tiu-ĉi premiero. Mi estas tre feliĉa, ke ĉio bone sukcesis.

Nia agado estis konata ankaŭ eksterlande. Tial konvinkitaj ke ni laboras konkrete por disvastigo de Esperanto en nia urbo kaj lando, kelkaj redakcioj donacis al ni ekzempleron de iliaj revuoj. Tiel, dum jaroj en nia asocio abundis "Heroldo de Esperanto", "Monato", "Esperanto", "El Popola Ĉinio", "Esperanto en Skotlando", "Inter Ni" (el Kanado), ktp.

Granda sukceso estis la tri senpagaj ekskursoj por niaj geesperantistoj. Du ekskursoj en 1996 (je 20-an kaj 28-an de aprilo), kiam per aŭtobuso, 40 geamikoj vojaĝis al belaj kaj historiaj lokoj de najbaraj distriktoj. La tria ekskurso okazis je 15-an de septembro 1997, per kio mi finis mian agadon kiel prezidantino de nia loka E-asocio. Laŭ statuto, mi estris la lokan E-asociacion dum du mandatoj.

Malgraŭ malfacilaĵoj ĉio estis treege bela, ĉar tiun tempon (januaro 1990-oktobro 1997) mi dediĉis al Esperanto. Nun retrorigardante al mia agado, feliĉe mi povas diri, ke la sukceso estas rezulto de mia senĉesa laboro.

SZÚCS Iréné, ORADEA

## ARANĜOJ

### **84-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

*31 julio - 7 aŭgusto 1999, BERLINO, GERMANIO*

La aliĝkotizoj por Rumanianoj estas la jenaj:

Aliĝkategorio	ĝis 31.12.98	ĝis 31.03.99	poste
ne individua membro de UEA	280 NLG	335 NLG	390 NLG
individua membro de UEA	225 NLG	270 NLG	315 NLG
kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA	170 NLG	200 NLG	235 NLG
kunulo/junulo/handikapulo, individua membro de UEA	112 NLG	135 NLG	155 NLG

**La kotizo ne estas repagebla.** senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

**La kotizo ne inkluzivas loĝadon,** ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagendajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperas en la Dua Bulteno. La kotizo inkluzivas nenian asekuron.

Senpage aliĝas: -infanoj kaj gejunuloj naskiĝintaj post 31.12.1978;  
-nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

Aliĝu al: UEA, Nieuwe Binnenweg 176,  
3015 BJ Rotterdam, NEDERLANDO.

### **BUDAPEŝTA SILVESTRO**

*29 decembro 1998 - 2 januaro 1999, BUDAPEŝTO, HUNGARIO*

Partoprenkotizo: -160USD, loĝado en hoteloj kun dulitaj ĉambroj kun duonpensiono

-110USD, loĝado en turisma kategorio (3-4 litaj ĉambroj)

Aliĝu al: Vojaĝoficejo Espertur

H-1061 BUDAPEST, Andrásy út 27, HUNGARIO

Tel.: +36-1-2680306; Faksilo: +36-1-2680331

Hejmpaĝo: [www.c3.hu/~esperantohea](http://www.c3.hu/~esperantohea);

Retadreso: [esperantohea@mail.c3.hu](mailto:esperantohea@mail.c3.hu)

**Serenan Kristnaskon kaj  
Feliĉan Novan Jaron!**

La redakcio de BAZARO.

ASOCIŢIŢIŢI DE ESPERANTO  
C.P. 1111  
RO-3400 CLUJ-NAPOCA  
ROMANIA

ORIOIUS ORIOIUS  
50L



Mustela erminea - Hermineaz  
L70



ROMANIA  
1997




AL. DRĂSCU  
ROMANIA  
1877-1894  
POSTA ROMÂNIA  
30L  
BUCURĂ, SIMONA



50  
de ani  
unicef

ROMANIA  
740 L  
L. C. BAZSE



2550 L  
ROMANIA  
habitat  
II  
L. C. BAZSE



SF. INTELE PASIV 1994  
ROMANIA  
60L  
POSTA ROMÂNIA



al

**IMPRIMATE**

**PAPP TIBOR  
TROMBITÁS u. 12.  
H-4031 DEBRECEN**